



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/7 - 7075. — Redaktas Dr Stanislav Kamarýt.

Resoluce VII. sjezdu československých esperantistů 4.—6. června 1949 v Liberci — Rezolucio de la VII-a ĉeĥoslovaka kongreso esperantista la 4—6-an de Junio en Liberec

Historie československých esperantistů je důstojná. České esperantské hnutí vzniklo v řadách brněnských dělníků a pracující inteligence již v roce 1902. Již od roku 1908 sdružovali se čeští esperantisté ve dvou svazech (Unio a Asocio), z nichž po první světové válce vznikl roku 1920 Svaz československých esperantistů (ĈAE), který od roku 1936 pracuje jako Svaz esperantistů Československé republiky (EAĈSR).

My, českoslovenští esperantisté, stojíme již od samého vzniku naší organizace na straně pokroku, sdružující se bez rozdílu ras, národností, náboženství a stavů.

Ale ne všude a ne všichni esperantisté jsou nositeli socialismu a pokroku. Podle liberalistické Boulogneské deklarace z r. 1905 může být esperantistou každý, ať používá esperanta k jakýmkoliv záměrům a cílům, a tedy i zpátečník, ano i fašista. To si pokrokoví esperantisté uvědomili. Proto roku 1947 na světovém kongresu v Bernu, na návrh zástupců z lidově demokratických zemí a za podpory zástupců i některých západních zemí bylo opětně zdůrazněno, že členy světového svazu Universala Esperanto Asocio (UEA) nemohou být elementy fašistické a protidemokratické.

My, českoslovenští esperantisté, byli jsme jednou z prvních obětí fašistické a nacistické války, jejíž hybnou silou byl velkokapitalismus, imperialismus a rasismus. Esperantský svaz byl prohlášen za protinacistickou organizaci. Desítky českých esperantistů bylo za okupace vězněno (František Březina, Josef Buben, Rudolf Burda, O. Ginz, V. Homola, Rudolf Hromada, Dr H. Jokl, Floriánová, V. Kalaba, O. Matzenauer, Pittner, Vilémová, P. Pokorný, Oto Sep, Richard Šedý, Stan. Žák) a popraveno (A. Mrázková, Ing. Slavík, Košťanský, Otto Petrovi, Jar. Benda, Rud. Koch, MUDr K. Marek, Jos. Raška, Marie Krousová, Stan. Malý, Jar. Rybařík, Josef Šafránek, Mir. Vajsar). A stejně tak i v jiných okupovaných zemích.

Historio de ĉeĥoslovakaj esperantistoj estas dignoplena. Ĉeĥa esperantista movado naskiĝis en Brno en medio de laboristoj kaj laboranta intelektularo jam en la jaro 1902. Jam de j. 1908 unuigadis ĉeĥaj esperantistoj en du Asocioj (Unio kaj Asocio), el kiuj post la unua milito en 1920 estiĝis Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista (ĈAE), kiu de 1936 laboras kiel Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko (EAĈSR).

Ni ĉeĥoslovakaj esperantistoj staras jam depost estiĝo de nia organizo sur fronto de progreso unuigante sen diferenco de raso, nacieco, religio, profesio.

Sed ne ĉie kaj ne ĉiuj esperantistoj estas portantoj de socialismo kaj progreso. Laŭ la liberalisma Bulonja deklaro el j. 1905 povas esti esperantisto ĉiu, uzu li Esperanton por iuj ajn intencoj kaj celoj, do ankaŭ reakciulo, ja eĉ faŝisto. Tion la progresemaj esperantistoj jam konscias. Tial en 1947 en universala kongreso en Bern, laŭ propono de delegitoj el popoldemokrataj ŝtatoj kun subteno eĉ de kelkaj delegitoj el okcidentaj landoj, estis akcentite, ke anoj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) ne povas esti elementoj faŝistaj kaj kontraŭdemokrataj.

Ni ĉeĥoslovakaj esperantistoj estis unu el la unuaj viktimoj de la faŝista kaj nazista milito, kies movoforto estis grandkapitalismo, imperialismo kaj rasismo. Esperantista Asocio estis deklarita kontraŭ-nazisma organizo. Dekoj da ĉeĥaj esperantistoj estis dum la okupacio arestataj (František Březina, Josef Buben, Rudolf Burda, O. Ginz, V. Homola, Rud. Hromada, Dr H. Jokl, Floriánová, V. Kalaba, O. Matzenauer, Pittner, Vilémová, pastro Pokorný, Oto Sep, Rich. Šedý, Stan. Žák kaj aliaj), dekoj estis ekzekutitaj (R. Bloch, Blochová, Jar. Benda, MUDr K. Marek, Stan. Malý, Marie Krousová, A. Mrázková, Ing. Slavík, Jar. Rybařík, Josef Šafránek, Košťanský, Otto Petrovi, Mir. Vajsar k. aliaj). Kaj simile en aliaj okupaciitaj ŝtatoj.

Sed ni vidas, ke post la militista malvenko de la germana faŝismo estas en imperialistaj landoj

Vidíme však, že po vojenské porážce německého fašismu se v imperialistických zemích fašistické tendence zcela nepokrytě hlásají, přesto, že neuplynula ani čtyři léta od skončení strašlivého krveprolití, do kterého uvrhnul lidstvo německý fašismus.

My, českoslovenští esperantisté, voláme proto všechny esperantisty světa, aby definitivně zúčtovali s fašismem a aby se s námi postavili po bok v boji proti zpátečnictví, za uskutečnění lidové demokracie a za vítězství všeho pracujícího lidu.

My, českoslovenští esperantisté, voláme všechny naše samideány — stoupence stejné ideje — aby se dali do služeb míru a pokroku všude tam, kde pod pokryteckým pláštěm tak zvané »demokracie« je vykořisťován člověk člověkem a kde se štuje do války pro kapitalistické zisky a pro ožebračení pracujícího lidu v zrůdném stínu třídní a rasové diskriminace.

Kapitalistický řád dává kapitalistovi svobodu vykořisťovat zaměstnance a přepychově a »svobodně« žít ze svých bezpracných zisků.

My, českoslovenští esperantisté, pracujeme pro mír a za svět socialismu, který odstraní lživý, nemravný řád, jenž nespasil lidskou společnost, ale plodí hospodářské krize a z nich hledá východisko válkou. — Naší povinností je odhalovatí bezohledně hnízda reakce a fašismu a strhnouti s sebou všechny, kteří ulpěli na »esperantu pro esperanto«.

Odmítáme tuto samoúčelnost, jež činí z esperanta jen kratochvíli, nic nebudující a nic neřešící. Stejně tak odmítáme snahu kapitalistické mezinárodní reakce o zneužití světového esperantského hnutí pro podvodné imperialistické cíle, skrývané pod falešným heslem kosmopolitismu. Jsme upřímnými vlastenci a milujeme vroucně svůj národ. Jsme součástí pracujícího lidu a spolu s ním budujeme usilovnou práci nový spravedlivější život v blahobytu, svobodě a bezpečnosti. Jsme hrdí na svou národní kulturu. Tím více usilujeme o dorozumění pokrokových pracujících lidí všech národů a zemí, kteří stejně jako my ctí ideály pokroku a opravdového, t. j. socialistického, humanismu a kterým stejně jako nám je esperanto mocnou zbraní v zápase o mír světa, mohutným prostředkem dorozumění národů, jež ideu míru a spolupráce národů šíří účinným slovem, tiskem i rozhlasem ke statisícům esperantistů ve všech státech a ve všech zemích světa. Svá předsevzetí v skutek obrátíme a esperanta použijeme jako velmi významného prostředku našich pokrokových snah. Jak to uděláme?

1. Když jsme již vyloučili reakční živly, provedeme a vytvoříme pevnou základnu pokrokového, reálného humanismu.
2. Rozšíříme zájem o esperanto v lidu, vrátíme se tak zase k lidu, který stál u kolébky esperanta ve správné předtuše, že v rukách pracujícího lidu se může esperanto stát mocným prostředkem dorozumění národů a mocnou zbraní míru.

proklamataj tute senkaŝe faŝismaj tendencoj malgraŭ tio, ke ne forpasis eĉ kvar jaroj depost la fino de terurega sangverŝado, en kiun jetis la homaron la germana faŝismo.

Ni ĉeĥoslovakaj esperantistoj vokas ĉiujn esperantistojn de la mondo, ke ili definitive fermu la kalkulojn kun faŝismo, ke ili starigu sin ĉe nia flanko en batalo kontraŭ reakciemo, por efektiviĝo de popoldemokratio kaj por venko de laboranta popolo.

Ni ĉeĥoslovakaj esperantistoj vokas ĉiujn niajn samideanojn, ke ili ekservu al paco kaj al progreso ĉie tie, kie sub ĥipokrita kaŝilo de tiel nomata »demokratio« homo estas ekspluatata de homo kaj kie oni provokas por milito pro kapitalistaj profitoj kaj por malriĉiĝo de laboranta popolo sub kriplaja ombro de klasa kaj rasa diferencigo.

Kapitalisma sistemo donas al kapitalisto liber-econ ekspluati la dungiton kaj lukse »libere« vivi el siaj senlaboraj profitoj.

Ni ĉeĥoslovakaj esperantistoj laboras por la paco kaj por la mondo de socialismo, kiu forigos mensogan nemoralan ordon, kiu ne savis la homan socion, sed naskiĝas ekonomiajn krizojn kaj serĉas el ili eliron per milito. — Nia devo estas senindulge senmaskigi nestojn de la reakcio kaj de faŝismo kaj irigi kun ni ĉiujn, kiuj algluiĝis al »Esperanto por Esperanto«.

Ni malakceptas tiun ĉi memcelecon, kiu faras el Esperanto nuran amuzilon nenion konstruantan kaj nenion solvantan. Same ni malakceptas tendencon de kapitalista internacia reakcio misuzi tutmondan esperantistan movadon por trompaj imperialistaj celoj kaŝataj sub falsa devizo de kosmopolitismo. Ni estas sinceraj patriotoj kaj ni amas arde nian nacion. Ni estas ero de laboranta popolo kaj kune kun ĝi ni konstruas per intensa laboro novan pli justan vivon de bonfarto, libero kaj sendaĝero. Ni fieras pro nia nacia kulturo. Despli arde ni strebas al interkompreniĝo de progresemaj laborantaj homoj el ĉiuj nacioj kaj landoj, kiuj egale kiel ni estimas idealojn de progreso kaj efektiva, t. e. socialisma, humanismo kaj al kiuj egale kiel al ni Esperanto estas potenca armilo en luktado por la mondpaco, potenca ilo por interkompreniĝo inter la nacioj, kiuj ideon de la paco kaj kunlaboro de la nacioj disvastigas en ĉiuj ŝtatoj kaj en ĉiuj landoj de la mondo per efikaj vortoj, per preso kaj per radio al centmiloj da esp-istoj. Niajn intencojn ni transformos en farojn kaj Esperanton ni uzos kiel tre signifan rimedon por niaj progresemaj klopodoj. Kiel ni tion faros?

1. Kiam ni jam estas eksigintaj reakciajn elementojn, ni kreu firman bazon de progresema, reala humanismo.
2. Ni disvastigos intereson por Esperanto inter la popolo, ni revenos tiel al la popolo, kiu staris ĉe lulilo de Esperanto en ĝusta antaŭsento, ke en manoj de la laboranta popolo Esperanto povas fariĝi potenca peranto por interkompreniĝo de la nacioj kaj potenca armilo de la paco.
3. Ni influos je ĉiuj esperantistoj de la mondo, ke ili laboru en la plej tuŝproksima kunlabor-

3. Zapůsobíme na všechny esperantisty světa, aby pracovali v nejtěsnější spolupráci s pracujícím člověkem, který je pokrokovou hnací silou proti parazitům lidské společnosti.
4. Zvýšíme naši informační službu v cizině, aby se dověděla, že československý lid si dovede vládnout sám, že dokázal zničené statky nejen obnovit, ale je i rozmnožit a že se stal spolumojovníkem za lepší a spravedlivější řád ve své zemi a na celém světě. Budeme informovat fakty, bez nadsázek a západnického zastírání a budeme stejnou službu požadovat od esperantistů celého světa.

Tak se stanou českoslovenští esperantisté pozitivními spolupracovníky lidu, opírajíce se o tradici velkého syna českého národa, Jana Amosa Komenského, který po neuskutečněných snáhách antických středomořských národů, které už tehdy cítily potřebu společného dorozumivacího jazyka, tehdy ovšem k účelům obchodním, první a to již na začátku 17. století, konkretisoval myšlenku všem národům společného jazyka míru, jímž se stalo Zamenhofovo esperanto.

Vytvářejíce již dnes mohutné společenství pokrokových lidí na celém světě, navazujeme opět na dobrou českou tradici husitského, lidového krále Jiřího z Poděbrad, prvního iniciátora mírové myšlenky spojených národů, s heslem: »Hradme se přáteli — ne valy«.

Ano, sloužíme získávání pokrokových přátel a chceme v této práci zdárně pokračovat. Necht žije lepší, pokrokový řád světa, necht žije světový mír a jeho nejpevnější záruka, t. j. všechen pokrokový lid světa v čele s mocným ochráncem míru, Sovětským svazem a jeho geniálním vůdcem generalisimem Stalinem.

Teprve vítězstvím pokrokových sil světa bude splněno v pravém smyslu esperantské motto: **Socialismus — Humanismus!**

Vydáváme a po celém světě rozšiřujeme informační bulletin »Esperanto-Servo« a své odborné měsíčníky »Esperantista« a »Esperantisto Slovaka«, vydali jsme a do všech dílů světa rozeslali ústavu ČSR, pohlednice s mapkou republiky, a do tisku jsme dali Nový školský zákon. Vyjde »Reportáž psaná na oprátce« od národního mučedníka a hrdiny našeho lidu Julia Fučíka; vydán byl zpěvník národních písní. Roztomilé dílko národní umělkyně Marie Majerové: »Město ve znamení ohně« vydá okresní rada osvětová v Kladně. K vydání připravujeme: Informativní stati o zemědělské reformě a o národním pojištění, Čtení o odborovém hnutí v ČSR a několik dalších významných publikací, jež mají informovati cizinu o naší republice.

Opírajíce se o tyto pozitivní výsledky své práce, vznášíme na ministerstvo informací vážnou a naléhavou prosbu, aby důrazně nařídilo výsadní knihkupecké společnosti Orbis, aby dovolala dovoz esperantských knih z ciziny v potřebném rozsahu a aby jejich distribuci pověřila naše knihkupectví. Nynější postoj Orbisu v této otázce škodí jak naší práci doma, tak naší posici v zahraničí.

ado kun laboranta homo, kiu estas progresema movoforto kontraŭ parazitoj de la homa socio.

4. Ni pligrandigos nian informservon al la fremdlando, por ke ĝi eksciuj, ke la ĉeĥoslovaka popolo scipovas regi al si mem, ke ĝi sukcesis la detruitajn valorarojn ne sole renovigi sed eĉ plimultigi kaj ke ĝi fariĝis kunbatalanto por pli bona kaj pli justa ordo en sia lando. Ni informos per faktoj, sen troigoj kaj okcidentmaniera maskado kaj la saman servon ni postulos de esperantistoj el la tuta mondo.

Tiel fariĝos la ĉeĥoslovakaj esperantistoj honestaj kunlaborantoj kun la popolo, apogante sin sur tradicio de la granda filo de ĉeĥa nacio, Jan Amos Komenský, kiu post neefektivigitaj penadoj de antikvaj nacioj apud Mediteraneo, kiuj jam tiam sentis bezonon de komuna interlingvo, tiam nature nur por komercaj celoj, unua, jam en komenco de la 17-a jarcento, konkretigis ideon de lingvo paca kaj al ĉiuj nacioj komuna, kiu poste fariĝis Zamenhofa Esperanto.

Kreante jam nun potencan komunecon de progresemaj homoj sur la tuta mondo, ni daŭrigas en bona ĉeĥa tradicio de la husana popolo reĝo Jiří z Poděbrad, unua iniciatinto de la pacideo de unuigitaj nacioj kun devizo: »Niaj remparoj estu amikoj, ne muroj!«

Jes, ni servas akirante progresemajn amikojn kaj ni volas en tiu ĉi klopodado sukcese daŭrigi. Vivu pli bona progressa mondordo, vivu mondopaco kaj ĝia plej firma garantio t. e. ĉia progresema popolo de la mondo frunte kun potenco pacdefendanto Sovetunio kaj ĝia genia gvidanto generalisimo Stalin.

Nur per venko de progresemaj fortoj de la mondo estos plenumita versence esperantista devizo: **Socialismo-humanismo!**

Ni eldonas kaj tra la tuta mondo disvastigas informan bultenon »Esperanto-Servo, niajn monatajn propagandajn revuojn »Esperantista« kaj »Esperantisto slovaka«, ni aperigis kaj en ĉiujn mondpartojn dissendis tradukon de Konstitucio de ČSR, ilustritan karton kun mapo de la respubliko, en presejo estas traduko de nova lerneja leĝo. Aperos »Raportaro el sub la pendumilo« de la nacia martiro kaj heroo de nia popolo Julius Fučík; aperis kantareto de popolkantoj. Ĉarman verketon de la nacia artulino Marie Majerová »Urbo sub signo de fajro« eldonos Distrikta Konsilantaro Kleriga en Kladno. Por aperigo estas preparataj Informaj raportoj pri la terkultura posedo, kaj pri nacia asekuro, Legindaĵoj pri sindikata movado en ČSR kaj pluraj pliaj publikigaĵoj, kiuj estas informontaj la fremdlandon pri nia respubliko.

Apogante nin sur tiuj ĉi pozitivaj rezultoj de nia laborado ni prezentas al la ministerio de informoj seriozan kaj impetan peton, ke ĝi ordonu al privilegiita librovendeja societo Orbis, ke ĝi permesadu importon de esperantistaj libroj el fremdlando en bezona amplekso kaj ke por ilia distribuo estu komisiita nia librovendejo. La nuna sinteno de Orbis en tiu ĉi demando malutilas al esperantista laboro enlande same kiel al nia pozicio en fremdlando.

KRONIKO ENLANDA

Kongreso en Liberec signifis grandan sukceson. Aliĝis 626 personoj krom tiuj, kiuj venis sen aliĝiloj. Estis akceptita grava idea rezolucio, kiun ni publikigas sur unuaj paĝoj de tiu ĉi numero. Detalaj raportoj aperos sur apartaj folioj, kiujn ricevos ĉiuj membroj.

„Prahaj elsendas per mallongaj ondoj“ estas flugfolieto eldonita de Instituto de E-Servo. Ĝi enhavas kompletan horaron de mallongondaj dissendoj (kelkaj estas samtempe dissendataj per longa ondo 1935 je 11,30—18,30 h.). Oni dissendas en la greka, serba, kroata, slovena, rusa, bulgara, pola, germana, hungara, rumana, angla, hispana, franca, itala, dana, norvega, sveda, ĉeĥa, slovakaj. En Esperanto oni dissendas je la 15,30—15,45 h. sur ondo 25,34 m kaj je la 21,00—21,15 horo GMT sur ondo 33,41 m. La flugfolieto tre taŭgas por almeti al niaj leteroj fremdlanden. Tiu listo estas represita en la franca gazeto „Parallèle 50“ el 27. 5. 1949. La fakto, ke en tiaj listoj dufoje aperas Esperanto, meritis atenton.

Ekzamena Komisiono kunsidis la 11-an de Junio 1949 en Gottwaldov. Prezentis sin al la ekzameno 1-a grada 17 kandidatoj, al la 2-a grada 2. Ekzamenis senato Dr Stan. Kamarýt, Rudolf Hromada kaj Josef Vondroušek.

Ricevis diplomojn pri lingva scio de Esperanto: Dobromila Bláhová, Antonie Evjáková, Jiřina Housová, Růžena Horáková, Marie Konečná, Vojtěch Kout, Drahomíra Koutná, Jiřina Krilová, Jindřich Krejča, Frant. Krejčí, Vladimír Kuchař, Vlasta Lagačová, Rudolf Němec, Daniel Prandorfi, Marie Rytířová, Marie Skýpalová, Karel Vít, ĉiuj el Gottwaldov. Estis donitaj notoj eminente 1, tre bone 8, bone 6, sufiĉe 2.

Diplomojn pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis:

Frant. Omelka, faka instruisto en Gottwaldov-Otrokove (por hejma tasko estis prezentitaj liaj verkoj).

Frant. Svačina, fervojisto en p. en Lanžhot (hejma tasko: Kial oni ne devas fumi).

La ekzamenitoj akceptu gratulojn kaj dankon pro sia sinnediĉo al lingvaj studoj.

Esperantistoj helpas savi la sanon. Ni legas sub tiu ĉi titolo en ĉeĥa bulteno de nia klubo en Prostějov el Majo 1949: Al unu loĝanto en Kopřivnice minacis perdo de kruro. Pliboniĝon povis doni sole injektaĵo ĉe ni nehavebla. Kiam diversaj provoj restis sensukcesaj, li turnis sin al esperantistoj. Dum kelkaj tagoj venis ampoletoj kun la savanta medicino. Donacintoj estis 3 kuracistoj (el Bruselo, Londono, Svislando), 1 apotekisto norvega, 1 katoliko nederlanda.

Japana konstitucio. En la Revuo Orienta aperis antaŭ du jaroj la japana konstitucio tradukita esperanten de Mazuso Inoue M. J. kaj Riej Hasegawa M. J., eksprofesoro de la Imperiestra Universitato en Keizyo. Ĉi tiun tekston tradukis en la ĉeĥan lingvon Dr T. Pumpr kaj prezentis ĝin por informo al la ĉeĥoslovaka Ministerio de Internaj Aferoj en Praha. — Estas tre instrue kompari la enhavon de tiu ĉi ĉarto, staranta sub forta influo de la Amerika juro, kun la ĉeĥoslovaka konstitucio, kies Esperantan tekston publikis 1949 nia Instituto de Esperanto-Servo.

LINGVO

Václav Kotrba: Terminaro por infanludoj

Ni prezentas tradukon de terminoj kolektitaj de Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj kaj publikigitaj en la Jarlibro 1942, faritan de nia kunlaboranto, kiu estas fakulo pri sportoj.

Ni forstrekis el la listo sole la plej komunajn vortojn. La aŭtoroj donis plurfoje alternativajn nomojn, kio estas saĝa; en tiu ĉi fakto malfacile estos atingebla unu vorto

Koncerto por esperantistoj. En la Esperantista Klubo de Praha estis la 1. 6. malgranda okazaĵo, kiun oni povas nomi unika: En la klubkunvenon venis hungara Biró-Kvarteto, gvidata de s-ano Josef Biró el Budapest, kaj prezentis tie malgrandan koncerton el komponaĵoj de Haydn. La hungara Biró-Kvarteto, kiu gajnis en Hungario la 2-an premion en muzika konkurso Bartók, koncertas ĉe la Internacia Muzikfestivala Printempo de Praha en la kadro de la Budapesta Orkestro, kaj la koncerto, prezentita en la E-klubo, estis ĝia unua memstara prezentado en Ĉeĥoslovakio. Pluaj memstaraj koncertoj de la Biró-Kvarteto, kompreneble laŭ pli granda skalo, sekvis la 27-an ĝis 30-an de Junio en la banloko Trenčianské Teplice. La kvartetistoj trovis en la klubanoj dankemajn k. entuziasmajn aŭskultantojn, kiujn tre ĝojigis tiu ĉi komplezo. (jm)

Distriktaĵoj de la 4-a regiono (Karl. Vary) kunvenis la 10-an de Aprilo en Cheb. Ĉeestis di-pe el Cheb, M. Lázně, K. Vary, Sokolov, prezidis regiona peranto F. Patera. Ni enskribas el la detala raporto tion, kio jam estas presinda, en Lokaj informoj. La raporto estas tre utila por nia agado.

Kunveno de la 6-a regiono (Liberec) okazis la 8-an de Majo en Česká Lípa en hotelo Národní dům je la 9,30 h. Estis reelektita regiona peranto Teo Novotný el Liberec kaj lia anstataŭanto V. Špúr el Doksy. Krome estis elektitaj regionaj referantoj por radio (Blecha el Liberec) kaj por gazetaro (M. Brunclík el Liberec). La regiono havas 12 distriktojn, estis starigitaj perantoj en Mimoň (Veselouš), Česká Lípa (J. Wildmann), Doksy (V. Špúr), Liberec (Blecha), Nový Bor (Mayer), Rumburk (Hošek), Turnov (Vařešová).

Regiono 4-a (Karlovy Vary). La kvara regiona kunveno okazis 19. 6. en Nejdek. Partoprenis 42 samideanoj. El la kunveno estis sendita saluto al EACSR kun la unuanima decido subteni la Asocion laŭ la direktivoj de Liberec-rezolucio. La regiona komitato, kiu konsistas el distriktaĵoj kaj klubaj reprezentantoj, funkcias tre bone. En la kunveno estis akceptita regularo kun detala plano, laŭ kiu la komitato laboras. Temas pri voĉdonrajto, pri regula sendado de la raportoj de Di-pe, pri regiona kaso, k. t. p. — Por demonstri antaŭ la publiko forton de la movado en la regiono estis aranĝitaj jam tri amuzaj tagoj: Kantado, deklamado, ludoj, komunaj ekskursoj tra la urbo kaj al la ĉirkaŭaĵo, eĉ la danco ne mankas. La Esperantista agado en nia regiono fariĝas unu granda regiona tuto.

Peresperantaj tradukoj el la japana. La slovakaj ĵurnalo Práca publikigis el esperantlingvaj tradukoj senditaj al s-o Imrich Zalupský de japana samideano T. Kurisu slovakajn tradukojn de noveleto „Ĉevalo“ de Tokunaga Sunao (25. 7. 48), „Viro kiu ne aplaudas“ de Seikiĉi Hugiĉimori (7. 8. 48), „Moskitoj en Bulgario“ de Kikue Makise (Dec.), „Dum la kanto de internaciano“ de Hiroŝi Kataoka (Jan.), „Letero el cementbarelo“ de Joŝiki Hajama (Jan.), „Trunko“ de Ŝigeharu Nakano (Jan.).

En la monata revuo Nový Orient aperis en Januaro „Pacmanifesto de japanaj verkistoj“ kaj la 28-an de Januaro ĉiuj slovakaj radio-stacioj disaŭdigis la legadon de la japana novelo „Vento antaŭ printempo“. (Laŭ E. Slovaka 4/5.)

por la sama nocio. Dubojn ni havas pri skutilo por koloběžka. Degenkamp en traduko de Skizoj pri Nederlando uzis por la sama ilo „aŭtopedo“ neniel zorgante klarigi, kial li malatentas popularan libreton de faka terminaro. Por batilo en iuj pilkludoj estas depost apero de la Terminaro plurfoje uzita rakedo, kiun jam enlistigis Plena Vortaro, por diferencigi inter raketo por speco de art-fajraĵo. (S.K.)

baseball basbalo
 bĥati na krátké vzdálenosti sprinti
 bokovati boksi, pugnodueli
 blechy, blešky saltidiskoj
 branka golejo, celejo; golo
 bridge briĝo
 brodiĝi se vadi
 brusle ĝlitiĵoj, patinoj
 brusliĝi ĝlitiri, patini
 crowlovati rampnaĝi
 dáma damludo
 — diskoparo en damludo
 — figuro de reĝino en ludkartaro
 — reĝina figuro en ŝako
 domino domeno, domenludo
 drak flugdrako, kajto
 drápký pentalito
 družstvo trupo
 eso aso
 etapa etapo
 ĝiniŝovati sprinti
 gól golo
 halma halmo
 házená handbalo, manpilko
 hláskovati literumi
 hockey hokeo
 honička tuŝludo
 hopsati hopi
 hupačka baskulo, pendolo, swingilo,
 balancilo
 hrací plocha tereno
 hrada bazo, hejmo
 hráti nesprávně faŭli
 chůdy stilzoj, marŝstangoj
 chyba miso
 jezdiĝi na koloběžce skuti
 „jezditi na koni“ ĵokei
 jockey ĵokeo
 káča turbo
 kaminky, drápký pentalito
 karambol karamboli
 karetní hra kartaro
 — piky piko
 — srdce kero
 — káro karoo
 — trefy trefo

— kluk bubo
 — dáma damo
 — král reĝo
 kočka a myš kato kaj muso, paroj
 kolo ruldinĝo; etapo; rondo
 koloběžka skutilo
 kolotoč karuselo
 kopaná piedpilko, futbalo
 kostky brikoj; ĵetkuboj (kuboj); dome-
 noj
 košíková korbopilko, netbalo
 koule (sněhová) neĝbulo
 koulovati se neĝbatali
 kriket kriketo
 krocket krocketo
 křížovka krucvortenigmo
 kulečník bilardo
 kulíčky bidoj, globetoj
 kůň houpací balancĉevalo
 kuželka keglo
 loutka marioneto
 lyže skio
 maňásek gantpupo
 meta bazo
 míček (korkový s péry) volano, plum-
 pilko
 míchatí karty miksi
 mlýnek nuloj kaj krucoj
 nebe-pekle (školka, čtverce) marelo,
 hopludo, lamludo
 ohňostroji artfajraĵoj, pirotekniko
 — žabka saltkrakilo
 pálka bastoneto
 pasák hejmpilko, rondkuro; (americký
 p.) basbalo
 patience pacienco
 plovati naĝi
 — na prsa brustnaĝi
 — na bok flankenaĝi
 — splývati na znak floti
 — crawllovati rampnaĝi
 — ŝlapati vodu treti sur la akvo
 — skákati po hlavě plonĝi
 počítadlo abako
 polo vodní akvipilko
 prak katapulto
 přeborník ĉampiono

přeskokování ransaltado
 raketa (v tenisu) rakedo
 — (v ohňostrůjství) raketo
 rohačky sledo
 rozdávatí disdoni (kartaron)
 rozdělovati tranĉi (kartaron)
 rozřaďovací závody, zápasy antaŭkon-
 kurso, provkonkurso
 rugby rugbeo
 rummy rumio
 řada vico; (býti na řadě) esti ies vico
 sáně sledo, ĝlitveturilo
 schovávačka kaŝludo
 skákati přes švihadlo skipi, ŝnursalti
 — na jedné noze hopi
 skládačky ĵiĝo, ĵiĝbildo, ĵiĝeniĝmo
 skluzavka ŝutejo
 slepá bába blindludo
 soutěž konkurso
 sport sporto
 sportovní den, slavnost sportfesto
 spurtovati sprinti
 stadion stadiumo
 stavebnice kovová mekano
 stolní tennis tablo-teniso
 šachy ŝako
 — pěšec peono
 — kůň ĉevalo
 — střelec kuriero
 — věž turo
 — dáma, královna damo
 — král reĝo
 šampion ĉampiono
 šarada ŝarado
 šipka saĝeto
 špaček timpo
 štafeta stafeto
 teď! ek!
 tennis teniso
 trofej trofeo
 trumí atuto
 turnaj turniro
 úsek etapo
 vlk turbo (metala)
 vor flosa
 vyhrati venki
 zápas maĉo
 žolík ŝercisto

NI LEGIS

„En la milito, tia estas la sorto, en la milito ankaŭ la infanoj batalas, diris iu en kunveno. Sed tio ne estas vero, infanoj ne batalas, infanoj nur suferas. Ĉar la batalantoj en la militoj estas ĉiam nur ne multaj, sed la viktimoj estas tro multaj kaj la suferado estas senfina.“ Tiel parolas patrino en rakonto de Jiří Marek tradukita de A. Malik en Speciala eldono de „Esperanto-Servo“ el Majo. La numero estas dediĉita al tiu kontraŭmilita rakonto kaj al artikolo pri Bedřich Smetana okaze de la 125-jara datreveno de lia naskiĝo. Niaj legantoj zorgu, ke la numero, aldona al nia lasta kajero, ne restu ĉe ili, sed estu sendita fremdlanden. Ĝi estos longe aktuala.

La aprila numero de *Bitidningen*, revuo de svedaj abelistoj, aperanta en Strängsjö, alportas dupaĝan artikolon pri la ĉeĥoslovaka abelkulturo kun multaj detaloj, interesaj ankaŭ por nefakuloj. La materialon liveris la Abelbredista unuiĝo en Praha, en la svedlingva artikolo estas noto, ke estas traduko el Esperanto kaj ni aldonas, ke ĝin faris nia amiko Jaroslav Šustr en Praha. (O. G.)

La turisma fako de la Nov-Zelanda Registaro sendos senpage al eblaj turistoj serion de belaj fotoj kun Esperanta teksto por montri, ke Nov-Zelando estas elstare vizitinda lando. Nepre skribu al Departement of Tourist and Health Resorts, Wellington, Nov-Zelando.

Bulteno de Argentina Esperantisto (Castelli 265, Buenos Aires), ciklostilita, monata po 12 paĝoj, estas pruvo de vivanta movado en tiu grava lando sudamerika.

Esperantlingva filmo „Danlando“. La danlanda ministerio pri eksteraj aferoj eldonis propagandan filmon pri Danio, kiu estas senpage pruntebla al ĉiu Esperanto-Klubo. La filmo estas farita de la konata filmisto Preben Frank. Ĝi estas 16 mm sensona filmo, kiu daŭras 45 minutojn kaj vidigas vivon, kulturon kaj folkloron en Danio. La landaj asocioj devas rilati por ĝin akiri kun dana ambasado. (Laborista Esperantisto, n-ro 5.)

Brazila kroniko en „O brasil esperantista“ ĉiam estas pruvo de vigla vivo esperantista en tiu granda lando.

„La vojo al la koro“, slovaka fabelo pri Loktibrada esperantigita de MEN aperis en la Maja n-ro de Monda Tribuno.

XXXIII-a Belga Kongreso de Esperanto en Bruĝo la 4—6-an de Junio estis sub devizo „Unu Belga nacio — unu nacia ligo — unu Belga Kongreso“.

Monda Tribuno (Wien IX, Rossauerlande 27), kies unuan numeron ni ne salutis tro afable, aperas regule ĉiumonate kaj ĝia enhavo estas pli interesa ol ni konjektis. Ĝi efektive ne pritraktas lingvajn kaj la eternajn organizajn problemojn esperantistajn, sed ĝi informas per populare skribitaj artikoloj pri sciindaĵoj el literaturo, scienco kaj tekniko. Ĉiu plua numero ŝajnas al ni pli leginda. La redakcio akceptu pro tio esprimon de nia deziro, ke ĝia gazeto daŭru kaj akiru multajn legantojn. Esperantlingva gazeto pri problemoj tutmondaj, sed ne esperantistaj, estas nepre bezona.

LOKAJ INFORMOJ

Aš. — Distrikta peranto Karel Jansa, aliĝis 6 novaj membroj al Klubo en Cheb.

Bojkovice. — Inter ĝelernantoj de meza lernejo estis kreita en dua duonjaro 1948/49 interesrondeto esperanta. Estis aranĝita mura ekspozicio, kiu informas kaj montras esperantajn interesojn: afiŝojn, gazetojn, vidajkartojn, poŝt- kaj glumarkojn eksterlandajn kaj leterojn ricevitajn de 10 lernantoj, korespondantaj kun fremdlando. La esperanta interesrondeton prizorgas fakinstruisto Alois Jašek. Similan servon al la publiko faras vitroŝranko ĉe pordego de la loka muzeo. (J. Tichoň)

Břeclav. — La 19-an de Junio aranĝis Esp.-Klubo en Břeclav rendezuon de sudmoraviaj esp. en Břeclav. Ĉeestis ankaŭ la vicprez. de EAĈSR R. Hromada el Praha. El Brno venis 36-membra karavano de esp. gvidata de RE PE J. Friedrich. Ĉiuj 57 partoprenantoj (inter ili ankaŭ s-anoj el Ostrava, Val. Meziříčí, Gottwaldov kaj Kunovice) vizitis per aŭtobuso la fame konatan parkon kaj kastelon en Lednice, kie ili en amika amuzo pasigis kelkajn horojn. La ĉefaranĝinto estis s-ano R. Trojna. (Fr.)

Brno. — Programo de la kunvenoj: 3. 5. Studo pri Dante Alighieri kaj Cervantes, M. Dostojevskij kaj L. N. Tolstoj (J. Vondroušek). 10. 5. Antikva Grekujo, prelego kun diapozitivaj (Jiří Kořínek). 17. 5. Pri H. C. Andersen (Nelly Žitová). 24. 5. Marvojaĝo en Hindoneziona, prelego kun filmstrio (Hilda Kořínková). 31. 5. El Hungaria antologio (Josef Friedrich). 7. 6. Vojaĝoj de R. Halliburton, la dua parto (Milada Vondroušková). 14. 6. La grupo el Turany prezentas (Jaromir Hoffner). 21. 6. Aro de rememoroj pri rikoltbrigado (Frant. Vyskočil). 28. 6. Antikva Romo (Marie Adamcová). 12. 7. Esperanto por skoltismo (Bohumil Zyka). 19. 7. Bona humoro antaŭ ĉio (Rudolf Nečas). 26. 7. Debatvespero. 2. 8. Traduka konkurso. 9. 8. Nia terĝlobo (Tomáš Borkovec). 16. 8. Letervespero. 23. 8. Nacia asekuro (Jos. Ambrož). 30. 8. Rakontoj de K. Čapek (Jaroslava Konečná). — La 14-an de Junio prelegis en la Klubo Asocia vicprezidanto R. Hromada pri aktualaj temoj. Antaŭ la kunveno li instruis en la progresinta kurso anstataŭ J. Kořínek.

Brno-Židenice. — Korektu en la adreso de kluba sekretario Miroslav Novák numeron de la strato! Devas teksti: Jiráskova 50. — Ni konstatu tie ĉi kun kontenteco, ke el la esperantistoj ekzamenataj la 2-an de Aprilo antaŭ la Asocia Ekzamena Komisiono inter tiuj loĝantaj en Brno ĉiuj krom unu estis membroj de la Klubo en Židenice. La klubo estu salutita pro tiu ĉi signo de sia laborado! Sed ĝi meritas laŭdon ankoraŭ pro multaj aliaj pruvoj de sia vivanteco.

Doksy. — Kurson por komenc. gvidis Vl. Severa kaj V. Špūr. Skriban finekzamenon faris 18 kursanoj. Komune kun ĝesamideanoj el Mimoň kaj Bělá pod Bezdězem oni ĝuis belan kursfinan vesperon sur velŝipoj kaj boatoj sur la lago. Sekvis amika kunsido en la lagborda restoracio. Pianludis instruistino Přibyllová. La programon riĉigis Pacas per rakontoj pri siaj aventuroj.

Duchcov. — Porpaca ekspozicio estis aranĝita antaŭ la Pasko de Esperanto-rondeto ĉe Dua meza lernejo gvidata de faka instruisto Jos. Kavka. — La rondeto eldonis belan dukoloran afiŝeton kun stelo kaj teksto ĉeĉa kaj esperanta: „Laboru por Esperanto, vi laboros por paco!“

Gottwaldov. — Post ekzameno la 11-an de Junio okazis je la 22-a horo en klasejo de Masaryk-lernejoj kunveno de la loka klubo prezidanta de Fr. Blaha dum ĉeesto de ĉ. 50 p. La ĉeestantaj komisionanoj alparolis la kunvenon. Hromada pri edifantaj spertoj en la kongreso en Liberec, Kamarýt pri generaciaj observoj, Vondroušek pri utilo funde lerni la lingvon. Ĉeestis direktoro de Studa instituto de Svit-entreprenoj Fr. Staněk, kiu en sia diskurso akcentis la progreseman kaj socialisman elementon en nia movado. La kunveno estis tre kuraĝiga por plua laboro.

Hradec u Opavy. — Ant. Frantl, prez. de Grupo en Opava, prelegis pri Esperanto la 19. 4. Multaj ĉeestintoj, ankaŭ el Opava kaj Ostrava. Financa gajno dediĉita al la nova grupo en Vitkov.

Cheb. — Tre vigla klubo agado. Oni kunvenas du foje dum la semajno en nombro de 15-20. Du kursoj por civitanoj kaj lernejinfanoj finitaj. La klubo havas nun 51

membrojn, anojn de EAĈSR. La regionan amuzan tagon tagon partoprenis 51 ĝesamideanoj. Ĝi estis majstre aranĝita. Post amuza programo en la klubejo okazis komuna tagmanĝo, trarigardo de la kastelo, ekskurso al „Valo de Ohře“. Specialan atenton dediĉas la klubo al lernejoj infanoj kies sukcesoj estas laŭdindaj. 14 ĝesamideanoj el Cheb aliĝis al la somera lernejo en Doksy.

Chlumec n. C. — Kursfina festo en meza lernejo 26-an de Majo. El 80 ĝelernantoj restis ĝis fino 58, la kurso por progresintoj komenciĝis kun 11 kaj finiĝis kun 12 lernantoj. El ili 3 aliĝis al EAĈSR, 3 al Somera E-Kolegio en Doksy.

Jablonec n. N. — Jarkunveno de la Loka Grupo okazis la 25. 2. dum ĉeesto de 15 membroj. La kunveno salutis re-pe T. Novotný el Liberec, kiu skizis la samtempajn taskojn. La ĝisnuna komitato estis reelektita, prez. st. kapitano e. p. Josef Roubínek, V. luzich 22, sekretario Jeroným Janečka, Skřivánčí 66. La prezidanto estis elektita ankaŭ distrikta peranto.

Jáchymov. — Sv. Humpa prelegis pri E. en Junulara Asocio kaj varbis pluajn adeptojn de nia ideo.

Jaroměř-Josefov elektis en jarkunveno la 6. 3. en Josefov, hotelo Otta, prezidantojn (I-a kaj II-a) Frant. Nosek kaj Karel Holeček, sekretariojn Eva Figurová (Josefov, Na trati 138) kaj J. Emrle, kasistojn Mil. Jakobcová kaj Josef Ševčík, kaj pluajn 7 komitatanojn.

Karlovy Vary. — La 8-an de Majo regiona amuza tago kun aŭtobusa ekskurso al Andělská Hora kaj al Kysibl. 40 partoprenantoj estis tre kontentaj. Nune estas dediĉataj ĉiuj fortoj al la aranĝo de la supera E-kurso. ŬPIK eldonos propagandan faldprospekton en Esperanto.

Kolín. — Esperantista klubo kunvenas nun ĉiumerkrede je 20-a horo en hotelo Savoy.

Košice. — La 24-an de Majo festis Esp.-Klubo en Košice la 25-an datrevenon de sia fondiĝo. La soleno okazis en formo de koncerto, kiun ĉeestis ĉ. 70 pers. Pri la fondo kaj historio de la klubo raportis s-ano Josef Friedrich el Brno, la fondinto de la Klubo. La Klubon gvidas ankoraŭ ĉiam la 76-jara kunfondinto A. D. Kremer. (Fr.) — La ĝenerala kunveno de la loka grupo la 9. 2. elektis prez. J. Zalupský, sekretario A. Magera, kasistino H. Kaviaková. Kunvenoj ĉiumerkrede je la 19 h. en „Veritas“, str. Cyrilla a Metoda 1. (E. S.)

Mariánské Lázně. — Distrikta peranto lernejestro O. Pavelka serioze eklaboris. Jam estas kontakto kun Loka kaj Distrikta Klerigaj Konsilantaroj. Okazis prelego de O. Pavelka, Patera, Bystrický.

Mimoň. — Post fino de la kurso por komencantoj gvidita de K. Šolc el Mladá Boleslav, komenciĝis duagrada kurso por 23 entuziasmaj ĝejunuloj. Instruis V. Špūr el Doksy. Ĉiuj kursanoj bone sukcesis dum la fina ekzameno. Unu leciono estis pasigita en la naturo. Eĉ dum somero regulaj klubkunvenoj estrataj de la zorgema prezidanto Veselouš. Kursfina festo estis 23. 4.

Mladá Boleslav. — Nova adreso de la klubo: Antonín Rauvolf, faka instruisto, II/672.

Mladá Boleslav. — Jarkunveno de la Loka Grupo la 25-an de Jan. elektis honora membro s-ron Čeněk Nejedlý, lernejan inspektoron, kiu havas grandajn meritojn pri disvastiĝo de Esperanto en lernejoj de siaj distriktoj. Lernejajn kursojn gvidas Karel Šolc kaj Ant. Rauvolf; en Lernejo en Březno instruistino Drábová. La regiona peranto helpis al starigo de lokaj grupoj en Mimoň kaj en Jičín, kiuj ambaŭ vigle vivas. Agado de la lokaj grupoj estos pli intensigita per vico de prelegoj kun lumbildoj, kiun aranĝos la Loka Grupo en Mladá Boleslav. La grupoj interesataj anoncu sin tuj! Multon helpus reciproka korespondado de nove starigitaj grupoj en la regiono.

Nejdek. — La 1. 6. estis malfernita E-kurso por 23 komencantoj, Alvenis re-pe s-ano F. Patera, prezidanto de Cheba klubo R. Bystrický kaj M. Szmiegel el Cheb por prelegi kaj entuziasmigi la novajn adeptojn, en kio ili plene sukcesis. La klubo havas jam 18 pagintajn anojn. Estis elektita nova komitato, kies prezidanto estas F. Karika kaj sekretario M. Hegrová. Dum la amuza tago, kiu fariĝis festo de 65 jaroj de la „Patro de regiono“ MUDR

Vaněk, gajnis unuan premion en plej bona Esper. anekdoto 14-jara Skokan el Cheb.

Nové Zámky. — Interes-rondeto de Slovaka Esperanto-Societo kunvenis unuan fojon la 19. 3. en gimnazio kaj kun permeso de gimnazia direkcio organizis komunan lernadon ĉiujn sabatojn je la 13—14 horo.

Nový Bor. — Nova klubo fondita en kunveno la 27. 3. dum ĉeesto de 19 p. Re-pe T. Novotný skizis la taskojn kaj labormanierojn de niaj grupoj. J. Vildman el Česká Lipa klarigis kunlaboron inter la distriktoj. Estis elektitaj prez. Josef Vondráček, Dvorní 134, vicprez. Věra Marková, sekretario Stanislav Majer, Koněvova 292, tel. 143 kaj pluaj 7 komitatanoj. Sekretario kluba estas distrikta peranto.

Nový Bydžov. — Post tridek-jara paŭzo okazis dank' al Distrikta Kleriga Konsilantaro kurso por komencantoj la 16-an de Marto kun 25 p. en gimnazio, gvidata de instruisto Ant. Lauterbach el Chlumec n. C. La instruanto entuziasmigiĝis ĉiujn. La kurso daŭris 3 monatojn. Kelkaj el lokaj esperantistoj memoras ankoraŭ kurson el j. 1909, organizitan tiam de St. Balík, imposta oficisto, tre fervora laborinto, forpasinta tro frue. Tiam prezidanto de la klubo s-o Arnstein, kiu tre fervore sin dediĉis al la esperantista laboro, transloĝiĝis Parizon.

Olomouc. — La ĝenerala kunveno de Esperantista Societo en Olomouc (10. 2. 1949) decidis esprimi sian grandan dankon al siaj du plej malnovaj esperantistoj, al s-ano Jaroslav Masný, fondinto de fame konata eldonejo Moraviaj Esperanto-pioniroj kaj al s-ano Josef Řebíček, kiu jam longjare laboras pri la faka fervojista terminologio, kaj elektis ilin ambaŭ honoraj prezidantoj.

Opava. — En kunveno de filatelistoj prelegis ŝkpt. Kryštof Opavský pri signifo de E. kaj varbis 13 interesojn. — S-o E. Goba donis al la klubo dispono ejon en sia restoracio senpage ĉiujn mardojn. — Centra Nacia Komitato de la urbo donis 2000 Kčs subvencio por vojaĝo al Liberec; la klubo dividis ilin al 4 junuloj. — Da malnova papero estis kolektitaj 344 kg. — La grupo havas jam 62 membrojn. — La grupo sukcese zorgas, ke novaj grupoj estu fonditaj en najbaraj lokoj. Tio estas tre dankinda laborado. — En Sept. 1948 aldonigis la grupo propagandilojn al manĝkartoj en restoracioj; liveris ilin proprakoste grupa sekretario. — Propagandan diapozitivon projekciis tri kinejoj. Senpagan projekciadon permesis Ĉs. ŝtata filmo laŭ peto de la grupo. — Jarkunveno okazis la 3. 3. kaj estis al ĝi prezentita detala tre interesa raportaro, kies kopiojn ricevis krom ni re-pe kaj di-pe. Ĉeestis 16 membroj kaj 10 gastoj. La kunveno spontanee dankis sekretarion O. Erben pro lia modela senlaca laborado. La prezidanto dankis ankaŭ al s-inoj Ficková kaj Matušková precipe pro varbado de kursanoj. Estis elektita honora membro kleriga inspektoro J. Pišala pro meritoj, kiujn li akiris subtenante nian movadon en la urbo. La elektita komitato dividis al si la funkciojn en la kunveno la 13. 3. jene: Prez. Ant. Frantl, vicprez. Josef Bittner, sekretario ŝkpt. Oto Erben, propaganda kaj gazeta referanto ŝkpt. Kryštof Opavský, kasisto Jan Steyer, protokolisto Jar. Kuzník, revizoroj Rudolf Hadrych kaj Adolf Wittoszek.

Ostrava-Radvanice. — E. K. Nova vivo okazigis jarkunvenon la 27-an de Marto. Elektitaj funkciuloj: Prez. Pavel Bilbeber, vicprez. Ant. Glet, sekr. Adolf Staňura, kasisto Lad. Šťastný.

Pardubice. — Kurso por progresintoj komenciĝis en Aprilo, gvidas Frant. Návka laŭ Kühnl-lernolibro, 8 partoprenantoj.

3-a slovaka Esperanto-Kongreso en Bratislava 30. 7. — 1. 8. 1949.

La LKK atentigas la kongresantojn, ke ili aliĝu plej baldaŭ, por ke ĝi povu ĝustatempe prizorgi loĝejojn. Por tiuj, kiuj aliĝas malfrue, ĝi ne povas garantiĝi hotelĉambron, sed amasnoktejo estos je dispono.

Ni rekomendas al niaj membroj respekti tiun deziron kaj aliĝi baldaŭ. Aliĝilon sendas Slovaka Esperanto-Kongreso en Bratislava I, Zámocnícká 8/I.

Plzeň. — Unua sukcesa kurso, gvidita de juna samideano Reiserová en Domo de la kulturo kun 30 komencantoj (laŭ lernolibro de Kilian) komenciĝis la 18-an de Marto, finiĝis 27-an de Majo. Regulaj kunvenoj de la junularo en la klubejo, strato Gorkého 1, ĉiun lundon. Gvidas ilin nun Kastner. Per amuza maniero ili plenumas la rolon de perfektigaj kursoj. Nia Kvinjara plano: La grupo anoncas al la VII-a Kongreso de EAĈSR plenumon de sia unua tasko: atingon de 100 membroj en 1949. Pro nekonforma organizo de la ĝenerala manifestado ne estis eble plenumi la duan taskon, t. e. memstaran manifestadon la 1-an de Majo. La membroj preparas kopiojn de siaj leteroj, kiuj informas laŭvere la fremdlandon pri nia respubliko kaj ĝia vojo al socialismo. La kopioj estos komune prezentitaj al niaj centraj oficoj por provi plenumon de la 3-a parto de nia Kvinjara plano. La 4-a parto, vojaĝo al 22-a SAT-Kongreso en Parizo, estos plenumita en Aŭgusto 1949. Kaj la kvina tasko, eduko de la membraro al socialismo, estis modele plenumita per invito de distrikta referantoj partiaj, kiuj dum 4 tutvesperaj paroladoj klarigis la historion de la bataloj de laborista klaso, hodiaŭajn aktualaĵojn kaj la taskojn de nia vojo al la socialismo. (R.)

Praha. — Ĉe E-Klubo estis fondita Sekcio de laborantoj en trafiko. Ĝia sidejo estas en Kultura domo de ĉs. poŝto en Praha II, třída politických vězňů 16. Kiel gvidanto funkcias poŝt oficisto Ant. Janoušek. Sekcio intencas disvastigi Esperanton inter poŝtistoj, fervojistoj kaj tramistoj.

Příbor. — Ni havas du lernantajn rondetojn. Bedaŭrinde, esperanta instruado ĉe la junularo en meza lernejo estas post la regula instruado, kiam la junularo estas laca kaj peze interesiĝas. Lernejoj estroj ne permesis instrui Esperanton inter la regulaj horoj. En vespera kurso, kiu estas ĉiumerkrede de la 19—21-a horo en knaba meza lernejo estas 13 ĝekursanoj. Ĉiujn kursojn gvidas Antono Satek, faka instruisto. Aŭtune li aranĝis propagandan ekspozicion de poŝtmarkoj, kaj li ankaŭ prizorgas ekspozicion de tutmondaj esperantaj gazetoj sur urboplaco ĉe s-ro Čečetka. Korespondado kun anglaj kaj svedaj samideanoj kaj eksterlandaj skoltoj. Niaj malgrandaj samideanoj interŝanĝas poŝtmarkojn, siajn lerneajn pentraĵojn kaj aliajn objektojn. Ni intencas koncentri ĉiujn estintajn kursanojn kaj amikojn de Esperanto en fondota klubo.

Rokycany. — Grupo de EAĈSR aranĝis sian unuan printempan kurson la 8-an de Marto en mezlernejo, kunlaboris Loka Kleriga Konsilantaro kaj Vespera lernejo, instruis laŭ lernol. de Kilian 30 komencantojn Reiser. Fino la 17-an de Majo.

Svit. — Dr Ed. Sahliger gvidas laboron por esperantismo en rimarkinda amplekso. En bulteno de la Centra biblioteko de la Entrepreno aperis plurfoje sciigoj pri Esperanto, inter aliaj la Lenin-citato. Li gvidas mem kursojn, kiuj finiĝas per ekzamenoj, kaj li invitis s-on K. Šolc por gvidi kursojn en najbaraj lokoj. Ni raportos detale post fino de tiuj kursoj.

Trutnov. — La informo sur p. 31 sub titolo Turnov estas pri Trutnov, ne pri Turnov.

Turnov. — La informo sub tiu ĉi titolo sur p. 31 estas pri Trutnov. Pardonu!

Veselí n. M. — Pri la kurso finiĝinta la 24-an de Marto raportis la gvidinto J. Pavlacký al Klerigaj Konsilantaroj Loka kaj Distrikta. La kursanoj (27 p. ĉe kursfino) ricevis proponojn korespondi el Anglio, Belgio, Nederlando, Hungario, Pollando, Bulgario, Jugoslavio, Francio, Germanio, Italio, Svedlando, Danlando, Brazilo, Japanio, USA. Dum la kurso estis prizorgita por malsana loĝanto en Strážnice medikamento „Siropo Paoliano“, kiun sendis itala medicina profesoro Demetro di Demetrio el Bari.

Žlutice. — Distrikta peranto R. Kolář eklaboris serioze. Li kontaktas kun ambaŭ Klerigaj Konsilantaroj kaj ili jam promesis propran propagandon de Esperanto.

**Svazová kancelář je od 25. července do 7. srpna
zavřena (dovolená).**

ESPERANTISTA VIVO

Edziĝo. Zdeněk Řežáč kaj Marie Rýdlová el Svárov, p. Velké Hamry la 30-an de Aprilo en Jablonec n. N.

Naskiĝo. Al gesinjoroj Dvořáček en Hradec Králové filo Jan la 14-an de Majo.

Mortis Fr. Mothejzik (nask. 7. 10. 1902), poŝtkontroloro en Ústí n. L., la 13-an de Junio pro kor-apopleksio dum veturado en kajako sur Střekov-baraĵo. Li estis esperantisto de sia 17-jaro, membro de klubo en Praha, poste en Karlovy Vary, el kie li estis evakuita en 1938. En 1946 li estis sendita en poŝtoservon en Ústí n. L., kie li fondis klubon, kies li estis prezidanto tre aktiva. Senlaca, ĉiam ridetanta instruanto de komencantoj de ĉiuj amata kaj respektata. Li multe vojaĝis kaj vizitis kongresojn en Praha, Nürnberg, Wien. Ĉe lia kremacio la 17-an de Jun. en Střekov ĉeestis samideanoj el Ústí n. L., Podmokly, Teplice. Ni vidis lin plenan de vivo en Liberec. Despli sincera estas esprimo de nia kondolenco al liaj samklubanoj kaj al lia familio.

ČESKÉ LISTY O ESPERANTU

Švédský stát podporuje kursy esperanta. Švédský parlament také letos odhlasoval subvenci 5000 šv. korun na letní kursy esperanta, pořádané pro učitelstvo. Částky je použito pro kursy a též pro vydání účastníků na cestu a pobyt. (Škola-Kultura, 1. XI. 1948.)

Světová výstava dětských kreseb v Lyonu ve Francii konala se t. r. pod záštitou starosty města, prefekta a rektora tamější university. Na této výstavě bylo shromážděno více jak 3000 dětských kreseb z celého světa. Byla navštívena hlavně učiteli a vychovateli, pro něž byla velmi zajímavá a poučná, a též četnými představiteli veřejného života i zahraničními hosty. Pořádal ji esperantský klub v Lyoně. Je pozoruhodné, že i z Olomouce bylo tam zasláno a vystaveno několik kolekcí dětských kreseb, které sestavil již zemřelý řídící učitel A. Neužil. (Stráž lidu, Olomouc 3. XI. 1948.)

Latina a esperanto. V poslední době se obrátil papež zvláštním poselstvím k motocyklistům. V tomto dokumentu nazývá motocykl takto: Birota ignifera latice incitata, což znamená: Dvojkolka ohnivou tekutinou poháněná. Tím je znovu podán důkaz, že latina není schopna se státi pomocným dorozumivacím jazykem. Jak jednoduchý máme pro to naproti tomu výraz v esperantu: motociklo. (Stráž Severu, Liberec 24. XI. 1948.)

Propagace Československa v cizině — dobrá práce esperantistů v Gottwaldově. V minulém roce byl v Gottwaldově založen klub esperantistů. Kurs esperanta absolvovalo již 60 posluchačů a další kursy úspěšně probíhají i v letošním roce. V červnu budou v Gottwaldově státní zkoušky z esperanta, k nimž se až dosud přihlásilo 24 zájemců. V národním podniku Svět je 50 absolventů písemného kursu, pořádaného rovněž klubem. Esperantisté z Gottwaldova jsou v čilém spojení se zahraničními esperantisty, které informují o naší neúnavné práci pro světový mír. Gottwaldovským klubem esperantistů bylo zasláno do ciziny 50 překladů naší nové ústavy z 9. května 1948. Měsíčně je rozepisováno 100 kusů propagačních výtisků, vydávaných ministerstvem informací, v nichž jsou referáty o budovatelské práci v naší vlasti. Kromě toho rozeslal klub do různých států 200 brožur Nový Zlín, pojednávající o práci v národním podniku Svět, o životě zaměstnanců a vývoji závodu od roku 1945. (Nová politika, Brno 19. 3. 1948.)

Co se děje na povrchu a v hlubině. Na dole Patria I-III ve Světci mají horníci svůj asi patnáctiletý kroužek esperantistů, který se schází dvakrát v týdnu. (Práce, Praha 5. 4. 1949.)

Úspěch brigády esperantistů. Na stavbě přehrady Jiřího Dimitrova v Růžovém údolí v Bulharsku se minulého léta zvláště vyznamenala mezinárodní brigáda esperantistů, která dosáhla až 471 proc. nad normovaný výkon. V Bulharsku, právě tak jako v Maďarsku a v jiných zemích, je esperanto na rychlém postupu a požívá všech podpor veřejných institucí. (Nová politika, Brno 20. 4. 1949.)

KOMITATO DE LA ĈEĤA SEKCIO DE EAĈSR

Prezidanto:

Adolf Malík, Praha XI., Kalininova 5.

Vicprezidanto:

Dr Stan. Kamarýt, Chotěboř 853.

Vicprezidanto:

Rudolf Hromada, Praha XIX/7, Sochařská 2.

Ĝen. sekretario:

Jaroslav Mařík, Praha II, Malá Štěpánská 9.

Sekretario:

Jar. Mičová, Praha XVIII, Na Vořechovce 42.

Kasisto:

Hedva Nováková, Praha II, Na Slupí 17.

Komitatoj:

Marie Baldová, Praha II, Malá Štěpánská 7.

Anna Bárochová, Praha II, Sokolská 17.

Jiří Kořínek, Brno 14, Drtinova 46.

Ing. Lad. Krajíc, Čes. Budějovice, Žižkova 42.

Václav Lorenz, Praha XII, Lublaňská 32.

Antonín Slanina, Praha XVI, Nádražní 13.

Alois Šikl, Praha XII, Přiční 11.

Jan Valeš, Praha II, Na Pořící 42.

Josef Vondroušek, Brno, U botanické zahrady 31.

Vickomitatoj:

Vlast. Blažek, Olomouc, Dvořákova 36.

Frant. Kavan, Plzeň II, Alšova 2.

Theodor Kilian, Třebíč, Přičná 318.

Frant. Pytloun, Hradec Králové, Zamenhofova 1010.

Vlad. Slaný, Ostrava XI, Kutuzovova 29.

Karel Šolc, Mladá Boleslav, Železná 41.

Kontrola Komisionoj:

Frant. Buhr, Praha XVIII, Bělohorská 187.

Jiří Hromada, Praha XIX/7, Sochařská 2.

B. Řeháčková, Praha XI, Tomkova 25.

Vicmembroj de K. K.:

Václav Král, Praha XIII, Smetanova 14.

Václav Špür, Doksy, Městská spořitelna.

Komisionoj:

Gazeto: Redakto Dr Stan. Kamarýt, Rudolf Hromada, Ota Ginz, Administro T. Balda.

Librovendejo: Ota Ginz, Praha II, Stárkova 4.

Radio: Ad. Malík, Rud. Hromada, J. Mařík, A. Slanina.

Radio en Ostrava: Vlad. Slaný, Zdeněk Raška.

Lingvaj aferoj: Dr Aug. Pitlík, Praha II, Křemencová 21.

Literaturo: Dr Tomáš Pumpr, Praha XIX, Verdunská 8.

Tradukoj en manuskriptoj: B. Vlčková, Kladno 3, ĉp. 710.

Lernejoj: Theodor Kilian.

Ekzamenoj: Dr Stan. Kamarýt, Dr T. Pumpr.

Skoltoj: Stan. Lešinger, Praha, Pankrác, Libušina 34.

Gazetara servo: J. Kořínek.

Adreso: Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/7, p. schr.

7075.

Oficejo: Praha II, Malá Štěpánská 7, malfermita ĉiutage

14—18 hod., sabaton 8—12 hod.

Oficeja sekr.: T. Balda, Praha II, Malá Štěpánská 7.

Librotenisto: E. Pišvejc, Praha XIX, Žižkova 5.



Poštovní známka
s esperantským motivem

vydaná v červnu 1949

Rakouskou poštou

(v zelené barvě, 20 g.)

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ČSR v Praze XIX/7, p. příhr. 7075. Odpovědný zá-
stupce listu Dr Stan. Kamarýt. Členům Svazu zdarma. Členský příspěvek 70 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskne »Cik« v Karl. Varech. Účast
na poštovní novinové službě povolena řed. pošt. v Praze č. j. IA-Gre-2372 OB-48. Dohledací poštovní úřad Praha 022.